# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

merkredon, la 29-an de Junio, 2016 • numero du


## Saluto de la NASK-administranto

*de Ellen* EDDY



Saluton NASKanoj kaj KTFanoj, Mi ĝojas ke vi sukcese alvenis la universitaton William Peace espereble senprobleme.


Mi estas la administranto de NASK kaj mi provis faciligi vian alvenon kaj restadon ĉi tie. Mi interŝanĝis retmesaĝojn kun vi kaj provis solvi antaŭviditajn problemojn. Sed ofte estas aliaj problemetoj je la komenco kiujn ni ankaŭ povas solvi se vi sciigas min.

Mi loĝas en ĉambro #107 do frapu aŭ lasu mesaĝon sur la pordo. Vi ankaŭ povas telefoni min ĉe 206-300-9724.

Mi esperas ke ĉio iros glate kaj ke vi ĝuos vian partoprenon en ambaŭ programoj.

Portu kontribuaĵojn por la *Fasko* al la redaktejo (ĉambro 112), aŭ sendu ilin al **<nask.esperanto@gmail.com>.**

## Konsiloj por novaj NASKanoj



*de Lee* MILLER

*[English version follows.]*

Saluton, NASKanoj de 2016! Kaj bonvenon al Raleigh, Norda Karolino, kaj la Universitato William Peace.

Ofte mi emas skribi longajn mesaĝojn, sed ĉi-foje mi skribos koncize, por emfazi nur kelkajn gravajn punktojn.

- Ni feliĉas ke vi estas ĉi tie! Ni ĝojas ke vi decidis partopreni kaj lerni Esperanton dum la venontaj ok tagoj.
- Demandoj estas bonaj. Se vi ne komprenas ion, bezonas klarigon pri io, serĉas ion, scivolas pri io… demandu. Ĉi tie estas multaj homoj (ne nur la instruistoj) kiuj povas respondi kaj helpi.
- Tiu kiu ne parolas ne kultivas la kapablon paroli. La ĉefa afero pri NASK estas la okazo multe — konstante —paroli Esperanton. Se vi ne parolas perfekte, ne maltrankviliĝu. Jen sekreto: neniu parolas perfekte. Se vi timas erarojn, ne timu. Jen alia sekreto: ju pli da eraroj, des pli da lernado (aparte pri lingvolernado). Eraru kuraĝe!
- Ni volas ke via sperto ĉi tie ĉe NASK estu bona kaj kontentiga. Se ial ĝi ne estas, bv. diri ion al ni. Ellen aŭ alia membro de la teamo volonte aŭskultos vin, kaj provos solvi la problemon. Ni ne povas ĉion solvi, sed se vi diras nenion, ni ne havas manieron scii ke io ne estas en ordo.


Ĝuu la venontajn ok tagojn. Ja estos iom da laboro, sed samtempe multe da amuzo. Malstreĉiĝu, amikiĝu, kaj ne hezitu paroli Esperanton kiel eble plej multe.

★

Hello, NASK participants of 2016! And welcome to Raleigh, North Carolina and William Peace University.

I often tend to write long messages, but this time I'm going to write concisely, to emphasize just a few important points:

## Kio okazos hodiaŭ?



★ **7:30 – 8:15 atm**
Matenmanĝo
*Belk Dining Hall*

★ **8:30 – 12:15 ptm**
Kursoj
*Flowe, unua etaĝo*

★ **2:00 – 3:15 ptm**
KTF: tralegado de rolantoj, provprezentoj
*Flowe, unua etaĝo*

★ **7:00 ptm:**
KTF: filmvespero
*Flowe, unua etaĝo*

☞ *La tuta kalendaro troviĝas sur blanka tabulo en la unua etaĝo de nia dormejo.*

- We're happy that you're here! We're pleased that you decided to participate and to study Esperanto during the next eight days.
- Questions are good. If you don't understand something, need clarification about something, are looking for something, or are curious about something… ask. There are a lot of people here (not just the teachers) who can answer questions and help.
- If you don't speak, you don't develop the skill of speaking. The main value of NASK is the chance to speak Esperanto a lot — constantly. If you don't speak perfectly, don't worry. Here's a secret: no one speaks perfectly. If you're afraid of errors, don't be. Here's another secret: the more errors you make, the more you learn (particularly in relation to language learning). Err boldly!
- We want your experience here at NASK to be good and satisfying. If for some reason it isn't, please say something to us. Ellen or another member of the team will gladly listen to you and try to solve the problem. We can't solve everything, but if you don't say anything we don't have any way to know things aren't right.

Enjoy the next eight days. There will be some work, but also a lot of fun. Relax, make friends, and don't hesitate to speak Esperanto as much as possible.

# Anasoj en la aviadilo!

*de Tim Morley*



Mia lasta vizito al Usono estis antaŭ pli ol dek jaroj, kaj en la aviadilo hodiaŭ mi remalkovris forgesitan de mi kutimon de la usonanoj, t.e. la babiladon pri personaj bagatelaĵoj, kion faras nekonatoj je la renkontiĝo.

En la loko apud mi sidis forta memorigilo pri tiu kutimo. Ŝajne ne eblis por tiu homo subteni eĉ minuton da silento sen denove strebi lanĉi konversacion inter ni. Nu, foje mi ne kontraŭas babili, foje mi preferas trankvilecon, sed al la demanda lavango eĉ miaj plej kurtaj respondoj ne sukcesis komuniki mian tiaman deziron por momento da paco.

Do kion fari? Mi decidis fortimigi mian babileman najbaron, rakontante la plej nekredeblajn sensencaĵojn, kiujn mi kapablis elpensi; do al la demando, "*Pri kio temas via renkontiĝo en Raleigh?*" mi respondis per ŝtela ĉirkaŭrigardo, kaj unu preskaŭ flustrita vorto: "Anasoj." Tiam, eĉ sen atendi pluan demandon, mi rakontis, kiel la anasoj kaŝe observas nin ĉie, ke ili sekrete strebas regi la mondon, ke nia grupo provas malĉifri ilian stultsonan kvakon, kiu certe kaŝas kompleksan komunikadon inter ili, kaj tiel plu.

Fiksrigardata kaj konfuzita, mia najbaro timete oscedis, heziteme fermis la okulojn, kaj ŝajnigis endormiĝi. Do mi tiel sukcesis havi longan momenton da silento por legi, trinki, kaj rigardeti filmon.

Poste, mi timis, ke rekomenciĝos la *small talk*, sed la najbaro diris nur, "Pardonu min, ke mi endormiĝis."

"Ho, ne zorgu," mi respondis, "homoj ofte tiel reagas al anastezo."

# Lavejoj kaj kuirejoj

En la tria etaĝo de la dormejo estas malgranda kuirejo kun fridujo kaj mikroonda forno. Tie por ni estas boligilo, kaf-premilo, tasoj, kafo, te-saketoj, kaj plastaj kuleroj. Bv. purigi ĉion post uzado. Fine de NASK bv. redoni tasojn.

En la dua etaĝo estas lavejo, kun lavmaŝinoj kaj sekigiloj. Ili estas senkostaj. Ni havas botelon de lesivo *All* por komuna uzado. La lavmaŝinoj estas "alt-efikecaj": uzu malmulte da lesivo.

# Laundry rooms and kitchens

There's a small kitchen with microwave and refrigerator on the third floor of the dorm. We have an electric kettle, coffee press, cups, coffee, tea bags, and plastic forks there. Please clean up after use. At the end of NASK make sure you return cups, please.

The laundry is on the second floor of the dorm, with washers and dryers. They don't require coins. We have a bottle of *All* detergent for everyone's use. The washers are "high efficiency": use a very small amount of detergent.